

ESTAS VI LA LUMO DE LA MONDO – Komento al Evangelio de p. Aberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ *Mateo 5,13-16*

En tiu tempo Jesuo diris al siaj disĉiploj:

“Estas vi la salo de la mondo. Se la salo sengustiĝas, per kio ĝi estos denove saleca? Ĝi jam taŭgas por nenio. Nenio alia estas por fari, ol forĵeti kaj piedpremi ĝin.

Estas vi la lumo de la mondo. Urbo starigita sur monto ne povas esti kaŝita. Kaj oni ne bruligas lampon por meti ĝin sub grenmezurilon, sed alten, sur la lamingon, por ke ĝi lumu al ĉiuj, kiuj estas en la domo. Tiel same via lumo brilu antaŭ la homoj, por ke ili vidu viajn bonajn farojn kaj gloru vian Patron, kiu estas en la ĉielo”.

Post la proklamado de la beatecoj Jesuo sin adresas al siaj disĉiploj kiuj lin akceptis kaj diras al ili: “*Estas vi la salo de la mondo*”. Kiu estas la signifo de tiu salo? Ekde ĉiam en la antikveco la salo signifis tion kio konservas la nutraĵojn. La nutraĵoj, ĉar ne ekzistis fridujoj, estis metataj sub salon kaj tio ebligis ilian konservadon.

De tiu konservado de la nutraĵoj la salo en posta tempo transiris, en figura lingvaĵo, al reprezentado de tio kio igas valida kaj vera iun interligon. Ekzemple por doni daŭran valoron kaj validecon al iu dokumento, oni ĝin priŝutis per salo.

Do tiu salo, en la Malnova Testamento, eĉ iĝis la signo de la interligo de Dio kun lia popolo. En la libro de Levidoj, ekzemple, legeblas: “*Vi ne permesu ke malestu la salo*”, tio estas la fideleco, “*de la interligo de via Dio*”. Do la salo igas valida kaj daŭra la interligon inter Dio kaj lia popolo. Jesuo en la beatecoj proklamis la novan interligon inter Dio kaj lia popolo; nu, tiuj kiuj

lin akceptas, la disĉiploj, devas esti, per sia konduto kaj per sia vivo, garantiantoj de ĉio tio.

Do la fideleco de la disĉiploj al la beatecoj igas valida la novan interligon kaj ebligas la inaŭguron de la regno. Do Jesuo diras: "*Estas vi la salo de la mondo. Se la salo sengustiĝas...*" la evangeliisto efektive uzas iun verbon kiun oni ne utiligas por la aĵoj, sed por la homoj, ĉar la evangeliisto laŭvorte skribas "se la salo freneziĝas". Kion signifas tiu 'freneziĝi'?

Ĝi referencas al la vorto 'freneza', kiun ni poste retrovos en ĉapitro 7 de tiu ĉi evangelio, je versiklo 26, kie Jesuo parolas pri iu frenezulo kiu iris konstrui sian domon sur la sablo; kiam alvenis la riverfluo la domo estos fortrenita. Kaj tiu frenezulo kiu konstruas sur la sablo estas tiu kiu aŭskultas la vortojn de la Sinjoro, sed poste ne ilin aplikadas. Nu tiu salo kiu freneziĝas indikas la konduton de tiuj disĉiploj kiuj akceptas entuziasme la mesaĝon de Jesuo, sed poste ne ĝin aplikadas. Do Jesuo diras: "*Se la salo freneziĝas*", tio estas se vi ne aplikadas tiujn ĉi miajn vortojn, nenio alia povas ĝin igi saleca.

"*Nenio alia estas por fari, ol forĵeti ĝin*", laŭvorte la evangeliisto skribas "for", kio en la evangelio de Mateo ĉiam havas la signifon de foreco de Dio, do temas ĉiam pri negativa signifo, "*kaj piedpremi ĝin*", Mateo utiligas iun verbon kiu vere redonas la ideon de io kiu estas haketita, piedpremita "*de la personoj*".

Tio estas, se vi ne estas fidelaj, estas diranta Jesuo al la disĉiploj, al tiu nova interligo, al la beatecoj, vi, kiuj min sekvas, meritas nur la malestimon de la personoj, la personoj kiuj atendas de vi alternativon al tiu socio, kiu atendas de vi iun malsaman vivmanieron, se ili vidas ke vi akceptis tiun ĉi mesaĝon nur ŝajne, sed poste ne ĝin praktikas, ĝi seniluziiĝas kaj perdiĝas. Do vi meritas la malestimon.

Poste Jesuo transiras al alia ekzemplo: "*Estas vi la lumo de la mondo*". Lumo de la mondo je tiu tempo estis konsiderata Jerusalemo, estis konsiderata Izraelo. Profeto Jesaja en ĉapitro 60 skribadis, "*Iros la popoloj al via lumo*". Nu nun la lumo de la mondo ne plu estas io senmova, sed io moviĝanta, la grupo de la disĉiploj, kiujn poste, je la fino de la evangelio, Jesuo sendos disanonci tiun ĉi bonan novaĵon.

Kaj ĉi tie Jesuo faras ekzemplojn rilate tiun lumon. Li diras ke: "*Kaj oni ne bruligas lampon por meti ĝin sub grenmezurilon*". Kial la evangeliisto

utiligas tiun vorton 'grenmezurilo'. La grenmezurilo estis la ujo kiun oni utiligis por mezuri aŭ konservadi la grenojn, precipe tritikon. Nu la grenmezurilo estas bildo de tio kion oni donacas, de tio kion oni donas. La grenmezurilo do ne devas kaŝi la lumon, sed devas esti ĝia esprimo.

Ĉi tiu lumo manifestiĝas en la donacado, en la donaco de si mem. Fakte li diras: "*sed alten, sur la lampingon, por ke ĝi lumu al ĉiuj, kiuj estas en la domo*". Li plu diras: "*Via lumo brilu antaŭ la homoj, por ke ili vidu viajn bonajn farojn*". Jen la lumo estas la bonaj faroj. Estas la faroj kiuj manifestas tiun lumon. Jesuo do ne invitas instrui iun doktrinon, sed iun praktikon: la praktiko de la beatecoj manifestos videble kiu estas Dio, kiu estas la homo kaj estos tiu lumo kiu inundas la socion.

Sed tiuj faroj kiuj estas la lumo de la mondo, aldonas Jesuo, "*kaj glori vian Patron, kiu estas en la ĉielo*." Do ne sia gloro, sia admiro. Jesuo poste en la ĉapitro 6 riproĉas la hipokritulojn, nome teatrulojn, komendiantojn, kaj diros: "*Atentu ne plenumi viajn bonajn farojn antaŭ la homoj por esti de ili admirataj*", tio estas la peko de idolkulto.

La admirado kaj glorado de tiuj faroj oni devas elkursigi, kaj por la unua fojo en la evangelio de Mateo, Dio estas prezentata kiel Patro. Patro, en la tiuepoka kulturo, estas tiu kiu generas kaj transdonas la vivon, "*al via Patro kiu estas en la ĉielo*". La invito de Jesuo do estas ke la praktikado de la beatecoj estu tiu lumo kiu iom post iom inundas la socion kiu estas en la mallumo kaj kiu estas soifanta je la bona novaĵo.